

Ĉu agnoskigi Esperanton nemateria kultura heredaĵo havas sencon?

Jes kaj ne.

Esperanto inter folkloro klasifiko kaj politika kanonizo.

**Kvankam la ŝancoj por Esperanto tiurilate ŝajnas esti pli grandaj en
orienta Eŭropo, estas dubinde, ke tiu agnosko okazos sur monda skalo.**

Tri ekzemploj.

De Andreas Künzli (Svislando)

Enkonduko

Pri la signifo de la nemateria kultura heredaĵo

Nemateria kultura heredaĵo (anglalingve *intangible cultural heritage*) estas nomataj kulturaj formoj, kiuj povas esti senpere esprimataj tra la homaj scio kaj povo, kiuj estas transdonataj de generacio al generacio kaj kiuj estas konstante nove kreitaj kaj ŝanĝitaj. Kompare kun la moveblaj konstruaĵoj kaj moveblaj objektoj (ekzemple la konstruaĵoj kaj objektoj, kiuj apartenas al la monda heredaĵo kaj monda dokumenta heredaĵo de UNESKO) la nemateria heredaĵo ne estas tuŝebla.

La nemateria kultura heredaĵo ampleksas (laŭ la difino de la koncerna UNESKO-konvencio) precipe “morojn, prezentaĵojn, esprimformojn, scion kaj kapablon kun la koncernaj instrumentoj, objektoj, artefaktoj kaj kulturaj spacoj, komunumoj, grupoj kaj eventuale unuopaj personoj kiel parto de ilia kultura heredaĵo. Por pli konkreta identigo estas nomataj kvin sferoj, laŭ artikolo 2 de la Konvencio:

- a) parole transdonataj tradicioj kaj esprimformoj, inkluzive la lingvon kiel portanton (aŭ portilon) de la nemateria kultura heredaĵo;
- b) realigata arto (kiel muziko, danco kaj teatro);
- c) sociaj moroj kaj praktikoj, ritualoj kaj festoj;
- d) scio kaj praktikoj en interrilato kun la naturo kaj la universo;
- e) Faka scio pri tradicia metia teknologio.

La nocio kaj signifo de la “kultura heredaĵo” multe ŝanĝiĝis kaj larĝiĝis en la pasintaj jardekoj. La kultura heredaĵo ne finiĝas ĉe la konstruaĵoj kaj kolektoj de la kultura materialo. Ĝi ampleksas ankaŭ tradiciojn kaj vivantajn kulturajn esprimformojn kiel ekzemple ili estas menciitaj supre sub a-e. La konscio, ke la vivantaj kaj vivataj kulturformoj same apartenas al la kultura heredaĵo kiel senmoveblaĵoj, originas el la landoj de Azio kaj el la movado de la indiĝenaj popoloj kaj devus formi kontraŭan tendencon al la tradicia protektokoncepto de UNESKO, kiu forte koncentriĝis/as pri senmoveblaĵoj kaj kiu estas eŭropcentrismo. La konscio, ke ankaŭ en Eŭropo ekzistas riĉa trezoro de regionaj kulturformoj, kiuj ne estas ligataj nur al objektoj, estas pli juna.

La pli kaj pli populara agnosko de diversaj esprimformoj kiel nemateria kultura heredaĵo havas ankaŭ riskojn, nome tiujn de la komercigo kaj folklorigo. Pro tio oni nomas la nematerian kulturan heredaĵon ankaŭ vivanta kultura heredaĵo (anglalingve *Living heritage*, *Living national treasure*, *Living human treasure*) kun la signifo de regione aŭtoktone „vivata“ kultura tradicio ĉiuspeca, kiu ne estas flegata nur en la senco de la muzea konservado aŭ turisma prezentado de moroj, sed kiu prezentas vivantan kulturan aplikadon, kiu enradikiĝis en la ĉiutaga vivo de la homoj. Per tio la nocio de la nemateria kultura heredaĵo faras klaran limon al la moderna protekto de monumentoj.

UNESKO-konvencio pri la konservado de la nemateria kultura heredaĵo

Sur internacia nivelo precipe UNESKO fariĝis aktiva sur la kampo de la fakta kaj jura protektado de la nemateria kultura heredaĵo. En proklamaĵoj de la jaroj 2001, 2003 kaj 2005 ĝi nomis 90 aparte konservindajn nemateriajn kulturajn bonojn el ĉiuj mondaj regionoj kiel „majstroverkojn de la parola kaj nemateria heredaĵo de la homaro“.

En 2003 UNESKO adoptis la „Konvencion pri la konservado de la Nemateria Kultura Heredaĵo (anglalingve *Convention for the Safeguarding of the Intangible Cultural Heritage*¹). Ĉi tiu konvencio ekvalidiĝis en aprilo 2006, post kiam 30 ŝtatoj ratifis ĝin. La kulturformoj, kiuj jam troviĝis sur la koncerna listo de la majstraj verkoj, estis transigitaj al la Reprezenta Listo de la nemateria kultura heredaĵo de la homaro, la 5an de novembro 2008.

Laŭ la stato de 2018 al la Konvencio aliĝis 178 ŝtatoj.

Laŭ la Konvencio ekzistas du listoj kaj unu registro, de kiu iu kultura esprimformo aŭ modela projekto povas esti akceptita kun la celo konservi ĝin kiel esprimformoj kun aparta valoro.

- a) La reprezenta listo de la nemateria kultura heredaĵo de la homaro.²
- b) La listo de la urĝe konservinda nemateria kultura heredaĵo.³
- c) La registro de bonaj praktikaj ekzemploj.⁴

Sur la unua listo troviĝas 429, sur la dua 59 kaj sur la tria 19 enregistraĵoj (2019).

Al tio aldoniĝas apartaj landaj listoj de naciaj UNESKO-komisionoj.⁵

Ankaŭ laŭlande la difino pri nemateria kultura heredaĵo povas havi nuancojn.⁶

La postuloj kaj obstakloj por kandidateco ŝajnas en la praktiko iom variu de lando al lando. Dum en Germanio aŭ Svislando⁷ la kriterioj kaj decidmekanismoj por esti agnoskita kiel nemateria kultura heredaĵo eble ŝajnas esti iom pli seriozaj kaj striktaj ol en aliaj landoj. Ankaŭ la nombro de proponoj probable varias kaj ne ĉiu propono povas esti pozitive konsiderata.

Esperanto

Koncerne Esperanton, ĝia agnosko kiel nemateria kultura heredaĵo okazis ĝis nun en Pollando (2014) kaj Kroatio (2019), dum en Svislando la propono estis rifuzita (2017). Jen la detaloj.

1. Pollando

La 21an de novembro 2014 la Esperanto-organizaĵo „EDE-Pollando“ diskonigis en sia retujo la sekvantan ĝojigan mesaĝon:

„Estimataj amikoj, adeptoj kaj simpatiantoj de Esperanto,
karaj esperantistoj en Pollando kaj en la tuta mondo !

Permesu anonci la Epokan Novaĵon de [la]⁸ pola esperantistaro, ĉar danke al la intensa kunlaboro kun [la] Polaj Parlamentanoj de la Parlamenta Grupo Subtenanta Esperanton (PGSE), de Polaj Esperanto-Organizaĵoj, de la Pola Instituto de [la] Nacia Kultura Heredaĵo kaj kun [la] helpo de landaj kaj eksterlandaj Eminentaj Sponsoroj kaj Subtenantoj, ni ĝisvivis la honoron ricevi [la] aproban subskribon de

¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Convention_for_the_Safeguarding_of_the_Intangible_Cultural_Heritage, <https://ich.unesco.org/en/convention>.

² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/UNESCO_Intangible_Cultural_Heritage_Lists.

³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Liste_des_dringend_erhaltungsbedürftigen_immateriellen_Kulturerbes.

⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Register_guter_Praxisbeispiele.

⁵ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Immaterielles_Kulturerbe.

⁶ Vd. <http://www.unesco.org/culture/ich/doc/src/00078-EN.pdf>.

⁷ Vd. <https://www.kulturrat.de/positionen/anforderungen-fuer-listen-zum-nationalen-immateriellen-kulturerbe>, <https://www.unesco.ch/das-immaterielle-kulturerbe-auflisten>.

⁸ Pri la problemo de la (ne)apliko de la difinita artikolo en Esperanto fare de slavaj uzantoj vd. en la ĉapitro pri Kroatio.

la Pola Ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, prof-ino *Małgorzata Omilanowska*, kiu permesis lokigi ESPERANTON sur la Polan Liston de [la] Nemateria Kultura Heredaĵo.

La Ministro sankciis tiun decidon la 31-an de oktobro.

La sukcesa evento, iniciatita de [la] eminenta Honora Membro de Pola Asocio Eŭropo - Demokratio - Esperanto, samideano *Kazimierz Krzyżak*, kaj de la prezidanto de PGSE, [la] eminenta pola senatano prof. d-ro habil. *Edmund Wittbrodt*, permesas estonte proponi ESPERANTON sur [la] Reprezentantan Liston de UNESKO pri Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.

La 20-an kaj 31-an de novembro 2014 informis pluraj personoj:

Kun vortoj de espero kaj internacia amikeco, *Jerzy Antoni Walaszek* - prezidanto de Pola Asocio Eŭropo - Demokratio - Esperanto (EDE-Pollando).

Mi esprimas varmegan dankon por [la] apogo de la konkludo. *Kazimierz Krzyżak*, prezidanto de Gdinia Rondo EDE-PL.

Mi esperas [,] ke Esperanto kaj ĝia kulturo baldaŭ aperos oficiale sur la listo je la sesa pozicio. Amike, Eduardo Kozyra, vicprezidanto de EDE-Pollando.

Mi aligis min kun kora gratulo al tiu multpersona rondo de gratulintoj. Kun granda ĝojo salutas Edward Jaśkiewicz el la pola urbo Szczecin (Ŝćecin).

Sincere via EDE-ano Stanisłavo Rynduch.^{“9}

Kun dato 29-a de novembro la respondeca ministrino informis la publikon pri la decido jene:

„Estimataj Gesinjoroj,

Mi afable informas, ke per decido de la 31-a de oktobro 2014 [la] Lingvo Esperanto kiel portanto (aŭ portilo) de [la] Esperanta kulturo estis enskribita en la Landan Liston de [la] Nemateria Kultura Heredaĵo. Kore mi gratulas al [la] Proponantoj, kiuj akceptas [la] defion konservi belegan kaj eksterordinaran tradicion por la sekvontaj generacioj.

Mi esperas, ke la enskribo kontribuos al [la] promociado de [la] nemateria kultura heredaĵo kaj al [la] plikonsciigo de la tuta socio pri [la] graveco de la tradicio kaj de [la] intergeneracia kultur-transdono.

Kun vortoj de estimo

prof-ino d-rino habil. *Małgorzata Omilanowska*.^{“10}

En Pollando pri la nemateria nacia kultura heredaĵo okupiĝas la Nacia Instituto por la Heredaĵo, (pollingve Narodowy Instytut Dziedzictwa), kiu estas aŭtonoma instanco de la Ministerio de la kulturo.¹¹ Jam ekzistas pluraj registraĵoj sur la pola nacia listo kiel la kripa konstruado en Krakovo, ludado de sakfajlo en Podhale, skatolfarado en Cieszyn, dialekto de Varmio, kaŝuba brodado, falkdresado, abelbredado, rivera boatado de Ulanów, polaj popolaj dancoj, kulturaj tradicioj de la mikroregiono Biskupizna, kristnaskaj kantoj de la regiono Żywiec, konkursoj de Kumoterki, plektado en Pollando, procesio okaze de la festotago de la „Korpo de Kristo“ en Spycimierz, procesio de Jesuo Kristo en Łowicz, k.a.¹² Laŭ la skriba pravigo, publikigita en la retujo de tiu instituto, la iniciato ŝajnis esti akceptita precipe sur la bazo de la apogo flanke de iuj esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto kaj politikistoj, kiuj estis proksimaj al la politika partio „Civitana platformo“ (PO), dum la opinioj pri la

⁹ Vd. <http://www.e-d-e.org/Esperanto-aldonigxis-al-la-Pola?lang=eo>.

¹⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Pola_Asocio_Eŭropo_-_Demokratio_-_Esperanto#La_Unesko-listo_de_nemateria_kultura_hereda.C4.B5o_de_homaro. De la 17a de junio 2014 ĝis la 25a de oktobro 2015 M. Omilanowska estis pola ministrino pri kulturo kaj nacia heredaĵo en la registaroj de Tusk II kaj de Ewa Kopacz. Pri la persono vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Małgorzata_Omilanowska.

¹¹ Vd. <http://niematerialne.nid.pl>. La direktorino de la Instituto en la tempo de la akcepto de Esperanto estis Joanna Cicha Kuczyńska. Pliajn informojn en la pola lingvo vd. sub https://pl.wikipedia.org/wiki/Niematerialne_dziedzictwo_kulturowe

¹² Vd. http://niematerialne.nid.pl/Dziedzictwo_niematerialne/Krajowa_inwentaryzacja/Krajowa_lista_NDK.

afero flanke de aliaj politikaj fortoj, precipe de la partio „Pravo kaj Justeco“ (PiS), evidente ludis neniun rolon kaj ne influis la decidon. En la kazo de tiu pravigo temas pri interesa atesto, kiel tiu pola instanco tiam perceptis kaj difinis Esperanton, la esperantistojn kaj la Esperanto-movadon kaj -kulturon entute – ŝajnas ke temas pli pri folklorisma percepto de Esperanto kun kvazaŭ-framasona subkompreno:

„Esperanto estas internacia lingvo, kreita de Ludoviko Zamenhof (1859-1917), kiu naskiĝis en Bjalistoko. Li publikigis en 1887 lernolibron, entenantan la fundamenton de ĉi tiu lingvo, kaj subskribis ĝin per la pseŭdonimo ‘Dr. Esperanto’, kio signifas esperon. La vorto Esperanto adoptiĝis kiel nomo de la lingvo mem. Ĉi tiu artefarite kreita lingvo rapide ekpraktikis sian propran vivon kaj iĝis la bazo de la stabiliĝo de kreskanta grupo de uzantoj. Dum preskaŭ cent tridek jaroj surbaze de Esperanto formiĝis aparta esperantista komunumo, kiu baziĝis je la ideoj de Zamenhof kaj je propraj konvinkoj, kutimoj, tradicioj, literaturo, simboloj kaj eĉ siaspeca mitologio. Daŭre ekzistas multaj organizaĵoj kaj asocioj, kiuj flegas kontaktojn inter si kaj aktivis sur la kampoj de la scienco kaj disvastigo de Esperanto, en kio gravas la ideo de la ĝenerala homa interkompreniĝo pere de tiu lingvo. Inter la esperantistoj formiĝis forta identeca sento kaj grupa ligiteco super la konscio pri nacieca aŭ etna aparteno. Senti sin esperantisto implicas agnoski difinitajn valorojn kaj mondkoncepton.

Al la firmaj esperantaj tradicioj apartenas la Universalaj Kongresoj de Esperanto, ĉiujare okazantaj en alia lando, aŭ Artaj Konfrontoj (ARKONES) en Poznano. La samajn tradiciojn konsistigas ankaŭ la memoro pri la kreinto de ĉi tiu lingvo kaj pri la historio de ĉi tiu lingvo. Dum la renkontiĝoj de la esperantistoj oni kantas la himnon de Esperanto, prononcas festparoladojn kaj prezentas rakontojn kaj anekdotojn. Dum funebraj ceremonioj de esperantistoj oni montras flagojn. Siajn festotagjn la esperantistoj dediĉas al la naskiĝ- kaj mort-revenoj de Zamenhof, respektive ĉiun 15-an de decembro kaj 14-an de aprilo.

En la lingvo Esperanto formiĝis propraj frazeologio kaj diraĵoj, kiuj portas en si mem Esperantan kulturvaloron kaj karakterizas la specifajojn de ĉi tiu medio, kiel ekzemple la vorton ‘samideano’. Ekzistas ankaŭ riĉa literaturo, kreita en ĉi tiu lingvo. La Esperanta mitologio entenas antaŭ ĉio stereotipajn imagojn pri la rolo kaj ebloj de Esperanto, kiuj emfazas la facilecon de la lingvo kaj la kredon je la ‘fina venko’, kio signifas la universalan enkondukon de Esperanto en interhomajn rilatojn. La Esperanto-kulturo enhavas ankaŭ ritualojn kaj simbolojn, kiuj identigas kaj apogas la esperantistan komunumon. La simboloj de Esperanto estas antaŭ ĉio la blazono (kvinpinta verda stelo), la himno (*La Espero*), la flago kaj la verda koloro de la espero. Aliaj simboloj reprezentas la konturojn de la mondo (etendo de la lingvo en la mondo), manpremon (esprimo de la amikeco), la Babelturon (mal-kapablo de la interkompreno) kaj arbon, kiu simbolas kreskadon. Tiuj simboloj estas aplikataj al objektoj de la ĉiutaga uzo kaj al memoraĵoj. La definitivan vortumon de la propono por enskribi la ‘lingvon Esperanto kiel portilon de la Esperanta kulturo’ en la ‘Landan liston de la nemateria kulturheredaĵo’ antaŭis publika socia konsultado, kiu sekvigis multajn opiniojn flanke de esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto, kiuj subtenis ĉi tiun iniciaton.”¹³

Cetere, estas okulfrappe, ke la judeco de Zamenhof ne estis menciita, kio estas tipa por la pola Esperanto-movado, kiun kutime konsistigas naciismaj, komunismaj aŭ katolikaj medioj aŭ karakterizas nebula sintezo de tiuj medioj, kiuj ŝajne uzurpis la judon Zamenhof kiel polon kaj Esperanton kiel polan nacian heredaĵon.

Kiel la decido efektiviĝis pli proksime klarigis la pola esperantisto Roman Dobrzyński en la revuo *Esperanto* (UEA). Laŭ tio, la esperantistoj (t.e. EDE) reagis al enketilo de la Nacia Instituto por la Heredaĵo, kolektante subskribojn kaj sendante la materialon al tiu instituto. Post iuj diskutoj, konsultoj kaj ekspertizoj, kiuj estis faritaj de aro da personoj, kiuj modifis la komence faritan proponon kaj harmoniigis ĝin kun la nocio de la nemateria kultura heredaĵo, la definitiva decido estis farita de la tiama ministrino pri kulturo, kiu registris Esperanton laŭ la formulo „La lingvo Esperanto kiel portilo de la Esperanto-kulturo“ en la koncerna listo. Laŭ Dobrzyński, ĉi tiu kompreno ne nepre estas egala al Esperanto, sed ĝi pli konformas al la formuloj de UNESKO pri la difino de la nemateria

¹³ Retradukita de A. Künzli el la pola lingvo per la subteno de la gugla tradukilo (tra lia germanlingva traduko sur http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Polen.pdf, p. 187-88) kaj komparo kun la Esperanto-versio publikigita en *Esperanto* (UEA), februaro 2015, p. 46.

kultura heredaĵo. Tio estus ankaŭ esprimi de la agnosko de Esperanto kiel „kulturlingvo“ fare de iu ŝtato. Krom tio, estis dirite, ke oni agnoskis la Esperanto-kulturon kiel tian.¹⁴ Kune kun aliaj ŝtatoj, kiuj same agnoskos Esperanton nacia nemateria kultura heredaĵo, oni tiel povus proponi al UNESKO agnoskigi Esperanton kiel mondan kulturan heredaĵon.¹⁵

En iu raporto de Kazimierz Krzyżak, kiu estis publikigita en *Eŭropa Bulteno* de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), oni povis ekscii, ke por la subteno de la propono estis kolektitaj 1600 subskriboj. Samtempe li bedaŭris, ke la urboj Bjalistoko kaj Varsovio ne apogis la proponon. Tadeusz Truskolaski, urbestro de Bjalistoko, eĉ ne respondis, kvankam oni trifoje skribis al li. Ankaŭ la cetera Esperanto-movado mem indiferece rilatis al la propono, kaj UEA fuŝis la aferon, tiel ke la iniciato restis limigita al EDE-PL, kiel Krzyżak lamentis en sia raporto.¹⁶

Sendube, la iniciato de EDE-PL povas esti konsiderata kiel sukcesa. Tamen, el nepola vidpunkto leviĝas la demando en kiu senco aŭ ĝis kiu grado Esperanto povas aŭ devas esti konsiderata kiel pola nacia kultura heredaĵo.¹⁷ Flanke de EDE kaj de la poloj oni atentigis, ke Esperanto povus esti agnoskita de UNESKO kiel nemateria monda heredaĵo, se pliaj ŝtatoj registros Esperanton en siajn naciajn listojn, kiel tio okazis en Pollando. Samtempe leviĝas la demando, ĉu havas sencon kaj ekzistas la rajto kompari Esperanton kun diversaj aliaj folklorismaj esprimformoj kaj meti ĝin sur la saman nivelon de tiuj formoj por agnoskigi ĝin nacia kultura heredaĵo de iu ajn lando. Kompreneble, kritika diskuto pri ĉi tiu temo ne okazas en la Esperanto-movado, kiu esperas, ke ankaŭ aliaj landoj sekvos la ekzemplon de Pollando.

2. Svislando

Kiam en aprilo 2017 en la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), *Esperanto*, oni laŭte raportis pri tio, ke en Svislando okazas streboj agnoskigi Esperanton far la koncerna ŝtata instanco nacia nemateria kultura heredaĵo“ laŭ la UNESKO-kriterioj, la atendoj inter la esperantistoj estis verŝajne grandaj. Ĉar kelkajn jarojn antaŭe en Pollando tiaj streboj kondukis al rimarkinda sukceso: Esperanto estis, kiel supre raportite, agnoskita de la tiam ministro pri kulturo, Omilanowska, kiel nemateria kultura heredaĵo de Pollando kaj registrita en la koncerna nacia listo. Reprezentantoj de la civilsocio povas fari en la unuopaj landoj proponojn pri objektoj, kiuj estu agnoskitaj kiel nacia nemateria kultura heredaĵo, pri kio iu speciala komisiono decidas. En Svislando ĝis nun ĝenerale temis pri vivantaj tradicioj de difinitaj regionoj kiel la karnavalo de Bazelo, la Alpa foiro, la vinfero de Vevey, la ŝercoj de Apencelo, la fantomaj rakontoj de Centra Svislando, la kamparana pentrado, la popolaj dancoj, la frukta kultivado, la cepa foiro de Berno, la infana festo de St. Gallen, la pilgrimado al Einsiedeln, la bovaj luktoj de Valezo kaj diversaj malnovaj moroj, por kiuj en Esperanto traduko eĉ ne ekzistas.¹⁸

Tiel, en 2016 *Mireille Grosjean* (*1946), iama instruistino de la duagrada lernejo en Le Locle/NE kaj politike maldekstre orientata Esperanto-aktivulino, havis la ideon, en la nomo de Svisa Esperanto-Societo (SES), kies kunprezidantino ŝi estas, provi la samon en Svislando kun Esperanto, ĉar tio ja estis senpaga. Ĉar en Svislando okazis ĝenerala reviziado de la listo de la nacia nemateria kultura heredaĵo, kiu nomiĝas listo de la „vivantaj tradicioj“, ŝi sendis ĉi-koncernan leteron al la respondeca instanco. En Svislando proponoj el la publiko devas esti unue senditaj al la respondeca instanco de la koncerna kanton, en kiu loĝas la proponanto, en la kazo de SES kaj Grosjean do tio estis la kanton Neuchâtel. Tiu instanco antaŭselektas la proponojn por plusendi ilin al la respondeca instanco en Berno, la Federacia Oficejo de la Kulturo, kiu decidas sur nacia nivelo. La optimismo de la esperantistoj certe estis granda, kiam la kanton Neuchâtel, kie Grosjean loĝas, kie SES havas sian oficialan sidejon kaj kie Esperanto tradicie ĝuas la plej grandan ŝtatan simpatian en Svislando, komunikis al Grosjean, ke la propono de SES estis aprobita kaj plusendita de ĝi al Berno.

¹⁴ Vd. *Esperanto* (UEA), februaro 2015, p. 46.

¹⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/UNESCO_Intangible_Cultural_Heritage_Lists.

¹⁶ Vd. <http://www.europo.eu/documentloader.php?id=427&filename=eb-143-2014-11-tuta.pdf>, p. 1-4.

¹⁷ Pri tiu ĉi demando vd. ankaŭ mian kontribuon sub http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_pola_heredaĵo.pdf.

¹⁸ Vd. <https://www.bak.admin.ch/bak/de/home/kulturerbe/immaterielles-kulturerbe/umsetzung/liste-der-lebendigen-traditionen-in-der-schweiz.html>.

En julio 2017 la koncerna Federacia Oficejo publikigis la novan definitivan liston de la vivantaj tradicioj kun la novaj enregistraĵoj de tiu revizio. Ho ve, Esperanto mankis! Kiam A. Künzli skribis al la tiu Oficejo por informiĝi pri la kialo de la manko de Esperanto en la listo, la respondeca kunlaboranto respondis jene: „Fakte, «Esperanto» estis proponita por registrado en la liston de la vivantaj tradicioj de Svislando. Ĉe la aktualigo de la svisa listo la propono ne povis esti akceptita pro tio, ke laŭ la UNESKO-kompreno (artikolo 2 de la Konvencio pri la Konservado de la nemateria kultura heredaĵo) lingvoj en si mem ne povas esti konsiderataj en la listoj de la nemateria kultura heredaĵo. Registrado povas esti pravigita nur, se temas pri specife parolaj tradicioj kaj esprimmanieroj aŭ pri lingvo kiel portilo de la nemateria kultura heredaĵo (en formo de specifa kantradicio, legendaj tradicioj ktp.). Vi povas imagi, ke alikaze ĉiuj lingvoj de la mondo pretendus registradon en la liston por si, de la vaska ĝis la retoromanĉa.“

Do, ŝajnas, ke la artikolo 2 de la koncerna Konvencio:

a) parole transdonataj tradicioj kaj esprimformoj, **inkluzive la lingvon** kiel portilon de la nemateria kultura heredaĵo povas esti konsiderataj por la registrado en la liston, estis verŝajne aplikita kaj interpretita en la senco priskribita de la oficisto de la berna instanco. La (malscienca) argumentaro de SES kaj ties malintelektaj kaj iom sovaĝa maniero prezenti la aferojn kaj la percepto de Esperanto fare de la burokratoj de la koncerna svisa instanco, kiuj probable havas neniun realan imagon pri Esperanto, ĉar Esperanto ne estas konata kaj estas elmortonta en Svislando, supozeble ne kongruis.

Ioma ironio de la fino de la svisa historio konsistis en tio, ke anstataŭ Esperanto por la neuŝatela kanton estis elektita kaj registrita la kultura tradicio de la „neĝaj skulpturoj de La Chaux-de-Fonds“ en la liston de la vivantaj tradicioj de Svislando!¹⁹ La esperantistoj rezignis komenti tiun embarasan rezulton, kiun ankaŭ la tuta Esperanto-gazetaro nete prisilentis, same kiel ĝi kutime ekskludas ĉiujn malfavorajn novaĵojn pri la Esperanto-movado post kiam oni fanfaronis pri la sama temo. Ankaŭ Mireille Grosjean, la iniciatinto de la propono, krude silentis kaj eĉ ne menciis la fiaskon en la raporto de SES pri la jaro 2017.²⁰ Laŭ ŝia artikolo en la revuo *Esperanto* oni povis konkludi, ke la argumentoj, kiujn SES prezentis al la decidonta komisiono, verŝajne ne povis esti vere celtrafaj kaj kredindaj. Ĉi tiun honton SES certe estus povinta eviti, se ĝiaj entuziasmoj estus anticipe informigintaj pri la ŝancoj de la propono aŭ alimaniere vortumintaj la argumentaron.

3. Kroatio

En februaro 2019 la kroataj esperantistoj diskonigis la novaĵon, ke la Ministerio de la kulturo de Kroatio, Administra Oficejo por la protektado de la kulturheredaĵo, agnoskis la tradicion de Esperanto laŭ sia karaktero kiel nematerian kulturalan fenomenon en la senco de la artikolo 8, parto 1, alineo 1a de la Leĝo pri protekto kaj konservo de kulturaj fenomenoj, kun la sekvanta pravigo:

„[La]²¹ Internacia lingvo Esperanto estas planlingvo, kiun iniciatis Ludvig Lejzer Zamenhof kaj prezentis ĝin al la publiko en publikaĵo en la rusa lingvo presita en 1987 en Varsovio sub la titolo Internacia Lingvo ‘Mednarodni jezik’. Samjare aperis eldonoj en la franca, pola kaj germana lingvoj. La publikigo de tiu ĉi planlingva projekto koincidas kun la pli vasta historia kunteksto pri lingva kreado en la dua duono de la 19a jarcento, kiam al la publiko prezentiĝis kelkdeko de internacilingvaj projektoj

¹⁹ Vd. <http://www.arcinfo.ch/photos/regions/les-sculptures-de-neige-envahissent-la-chaux-de-fonds-390952>.

²⁰ Vd. SES informas, 1/2018 (<http://svisa-esperanto-societo.ch/SESi/2018-1-SES%20informas.pdf>).

²¹ Ankaŭ nuntempe diversaj slavlingvaj esperantistoj ankoraŭ ne kapablas ĝuste apliki la difinitan artikolon en Esperanto, kio signifas, ke ili erare utiligas la gramatikon de tiu lingvo ĝis nun. La ‘forĝado’ de la difinita artikolo en Esperanto povas impresi krude, vulgare kaj malklere. Diversaj komoj, kiuj mankis en la originala teksto, estis aldonitaj de la verkinto de ĉi tiu artikolo, jen kaj jen la vortordo kaj iuj prepozicioj estis ŝanĝitaj. Ekzistas PIV, kie oni povas kontroli ĉiujn tiujn lingvajn detalojn! Tiuj mankoj kaj aliaj stilaj malglatiĝoj faras tiajn tekstojn, verkitajn aŭ tradukitajn laŭ la kutimo de la burokrateca maniero de registaraj instancoj, precipe se ili estis influataj de la slava skribstilo, iom fuŝaj, sovaĝaj kaj tre malagrabla legeblaj. La frazoj estas ofte tiel malbone skribitaj, ke necesas reverki ilin. Eĉ se temas pri oficiala Esperanto-traduko el la kroata lingvo, ankaŭ tia traduko meritis esti bonstila. Precipe beletra verkistino kiel Spomenka Štimatec, kiu evidente estis gvida en la kroata kazo de la agnosko de Esperanto kiel nemateria kultura heredaĵo, devus rimarki tion. En tiaj okazoj, alilandaj esperantistoj devas perdi sian tempon por korekti la fuŝajn tekstojn de slavaj aŭtoroj, kio estas malagrabla kaj superflua tasko. De jardekoj oni kritikas certajn fuŝlingvaj kaj malbonstilajn verkaĵojn en Esperanto el slavaj landoj, tamen sen videbla pozitiva rezulto, ĉar samtipaj kreaĵoj ĉiam denove reaperas, kiel montras ankaŭ la pli supre citita pola ekzemplo.

kiel rimedo de nacie neŭtrala lingva komunikado. Kiel lingvo kun simpla gramatiko sen esceptoj, kiujn havas amase etnaj lingvoj, kun vortoj bazataj je eŭropa internacia leksiko kaj latinismoj (ĉirkaŭ 70%) kaj malpli je ĝermanismoj (20%) kaj el aliaj lingvoj, Esperanto supervivis ĉiujn siajn historiajn rivalojn kaj estas ankaŭ nuntempe uzata kiel alternativa rimedo de [la] internacia komunikado. Aparte ĝia graveco estis kaj estas ankaŭ nuntempe por la tiel nomataj malgrandaj popoloj. kiuj per tiu ĉi lingvo havis kaj havas [la] eblecon prezenti siajn kulturojn al la mondo kaj per ĝi mem konatiĝi kun la samspecaj atingoj de aliaj popoloj. La kroata kultura kaj scienca publiko el la komenco de Esperanto estis fundamente informita pri la planlingva situacio fine de la okdekaj jaroj, ĉar la fama kroata filologo Tomo Maretić dum la solena kunveno de la Jugoslavia Scienca Akademio en Zagrebo en 1891 dediĉis sian prelegon ĝuste al [la] strukture kompara analizo de [la] tiutempaj planlingvoj, kritike tuŝante ankaŭ Esperanton. Tiam la esperantista movado, kiu havos sian disfloradon en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento kaj dum la tempo antaŭ la 1-a mondmilito, troviĝis nur en la komenco mem, kaj inter [la] unuaj esperantistoj estis jam kelkaj unuopuloj el la teritorio de la nuna Kroatio. Organizataj formoj de la Esperantista Movado aperas en la jaroj 1907, 1908 kaj en [la] komenco de 1909, kiam en Zagrebo estis fondita Societo de Kroataj Esperantistoj, kiujn gvidis [la] leksikografo, ĵurnalistoj, antologiisto kaj tradukisto Mavro Špicer kaj [la] instruistino Danica Bedeković, pl. Pobjednički. Ili mem verkis [la] unuajn kroatajn lernolibrojn de Esperanto kaj redaktis la revuon *Kroata Esperantisto*, kies unua numero aperis en 1909 kaj sur kies titolpaĝo estis traduko de la poemo de Petar Preradović 'Mia Barko'. Estis du deklaritaj celoj de la menciita revuo: unuflanke ĝi devus disvastigi Esperanton en Kroatio kaj aliflanke ĝi devus enkonduki nian riĉan sed nemulte konatan literaturon en Esperanton, en misteran landon, kiu troviĝas nek sur la Luno, nek en la Kosmo sed en koroj de ĉiuj esperantistoj kaj en iliaj animoj. Jam en 1912 aperas antologio de kroata poezio en esperanta traduko de Mavro Špicer. Dum la tuta historio de [la] esperantismo en diversaj socipolitikaj ŝtatsistemoj, en kiuj Kroatio estis ĝis la nunaj tagoj, kroataj esperantistoj daŭrigis kontinue aktivajn, antaŭenigante [la] kroatan literaturon kaj kulturon en la mondo, kaj en tio ofte esperantaj tradukoj de verkoj el [la] kroata literaturo servis kiel bazo por traduko al neeŭropaj lingvoj kiel la ĉina, hinda kaj farsa. La plej nova ekzemplo de la diskonigado de [la] kroata literaturo en Esperanto estas [la] traduko de la konata, plurfoje premiita romano 'Nigra Patrino de la Tero' de Kristian Novak, aperinta en 2017. La tradukon efektivigis [la] kroata esperantisto kaj publikigisto Josip Pleadin. [La] kroataj esperantistoj donas escepte aktivajn, organizitan, sciencon, artan kaj kulturan kontribuon al [la] tutmonda esperantista komunumo, kiu intertempe evoluigis aŭtentikan kolektivan kulturon kaj identecon kun specifaj komunikaj praktikoj kaj paradigmoj, kun organiza strukturo kaj kulturaj fenomenoj kaj formuloj. Plue, kroataj esperantistoj riĉigas la kroatan kulturmedion per sia aktivado kaj kontaktoj kun alilandaj esperantistoj, organizante diversajn kongresojn, studaranĝojn kaj kulturajn manifestaĵojn en kiuj kunpartoprenas esperantistoj el diversaj landoj, kiuj transportas al [la] kroata medio per Esperanto kulturajn kaj artajn atingojn de siaj popoloj.

Rememorante [la] gravan rolon de Esperanto kiel rimedo por [la] diskonigo de [la] kroata kulturo en la mondo dum 100 jaroj de la E-movado en Kroatio, okazis en Zagrebo en novembro 2008 en la Filozofia Fakultato de la Zagreba Universitato internacia scienca simpozio sub la titolo 'Esperanto kaj [la] kroata kulturidenteco', en kiu partoprenis trideko da prelegantoj. Samkiel la prizorgo de lokaj idiomoj je nacia nivelo rekte kontribuas al [la] prizorgo de [la] tutmonda lingva diverseco kiel valoro per si mem pro la minaco, ke pro la formorto de idiomoj kaj lingvoj kun malgranda nombro de parolantoj (ĉ. 5000) malaperu aŭtoktonaj kaj neripeteblaj pensesprimaj specimenoj, kiuj kreas spiritkulturan heredaĵon de la homaro, same la prizorgo kaj defendo de la internacia lingvo Esperanto kiel tutmonda kulturlingva heredaĵo de la homaro gravas ankaŭ sur naciaj niveloj, ĉar tio ebligas al malgrandaj popoloj kiel la kroata prezenti siajn kulturatingojn per ĉi tiu nacie neŭtrala rimedo de [la] internacia komunikado al la monda esperantista publiko.²² La esperantista komunumo (ĉiuj parolantoj de Esperanto en Kroatio ĉu kiel individuoj ĉu unuigataj en societoj aŭ neformalaj grupoj) evidentiĝas en forta esprimado de komuna solidareco kaj socia kohezio²³ same kiel ĉe ĉiuj komunumoj.

²² Elstara ekzemplo de komplika fuŝega frazo, kiun plibonigi havas neniun sencon! Origine la vorto 'prezenti' staris inter 'komunikado' kaj 'al la monda esperantista publiko'.

²³ Ĉi tiu vorto ne ekzistas en Esperanto; prefere uzu 'kohereco'.

La rolo de Esperanto kiel lingva peranto por [la] disvastigo de la kroata kultura kaj arta kaj aparte de [la] literatura heredaĵo kaj moderna literatura produktado estas argumento por enskribi ĉi tiun lingvon kiel nemateria atingiĝo en [la] Registron de [la] nemateria kultura heredaĵo de la Ministerio de Respubliko Kroatio. La Komisiono por la nemateria kultura heredaĵo de la Ministerio de la Kulturo dum sia kunsido okazinta la 29-an de majo 2017 taksis, ke la tradicio de Esperanto en Kroatio havas [la] karakteron de nemateria kultura fenomeno laŭ la difino de la Leĝo pri Konservado de [la] Kultura Heredaĵo en la paragrafo 9, parto 1, alineo 1. Baze de [la] transdonita dokumentaro kaj prezentitaj faktoj, kaj pro la rekomendo de la Komisiono por [la] nemateria kultura heredaĵo, la Faka Komisiono por [la] konstato de la karakterizoj de [la] kultura fenomeno, dum sia kunsido okazinta la 18-an kaj 19-an de decembro 2018, konstatis, ke la tradicio de Esperanto en Kroatio havas karakteron de kultura fenomeno. Akceptante ĉi tiun skriban decidon harmonie kun la artikolo 12, parto I de la Leĝo pri konservado de kulturaj heredaĵoj, estas aplikataj je Esperanto laŭ la citita Leĝo kaj aliaj preskriboj, kiuj rilatas al kulturaj fenomenoj.²⁴

La prilaborita kulturfenomeno estos enskribita en la Registron de kulturfenomenoj de Respubliko Kroatio sur la listo de protektitaj kulturfenomenoj sub la numero Z – 7298. Al la dirita kulturfenomeno el punkto I. de la citita Decido oni aplikas [la] Leĝon pri protekto kaj konservado de kulturfenomenoj kaj ĉiujn regularojn, kiuj rilatas al kulturaj fenomenoj.²⁵

Se en Kroatio iu objekto estis agnoskita kiel nemateria kultura heredaĵo, ĝi devas ricevi atenton kaj apogon laŭ la sekvantaj manieroj:

- Oni devas certigi la atingeblojn de la kulturfenomeno por la ĝenerala publiko;
- Instigi [la] kunlaboron de unuopuloj, grupoj kaj la komunado, kiuj heredigas la fenomenon rilate identigon, difinon, plu kreadon kaj transdonon de la heredaĵo;
- Popularigi kaj diskonigi la kulturfenomenon per okazigo de ekspozicioj, fakaj renkontiĝoj per elektronikaj medioj, aŭd- kaj vid-dokumentado kaj alimaniere;
- Instigi [la] transdonon kaj flegadon de la kulturfenomeno;
- Instrui la necesan fakan personaron por transporti la scion per seminarioj kaj laborejoj de la formala kaj neformala instruado;
- Daŭrigi la esploron de la kulturheredaĵo, per adekvata dokumentado en ĉiuj formoj kaj manieroj de [la] moderna prinotado kaj per faka kaj scienca valorigado;²⁶
- Diskonigi la funkcion de la kulturfenomeno en la socio kaj enplekti la protekton de la fenomeno en planitajn evoluprogramojn;
- Interesigi la publikon kaj protekti la fenomenon, konsiderante la procezojn de [la] tutmondigo kaj de [la] sociaj transformiĝoj por eviti [la] danĝeron, ke la fenomeno malaperu, estu detruata aŭ disvendata;
- La portantoj de la kulturheredaĵo estas taskigitaj²⁷ protekti la fenomenon.²⁸

En la praviga teksto okulfrapas diversaj strangaĵoj, precipe la troa fokusado al la pasinteco de Esperanto (19a jarcento, unua jardeko de la 20a jarcento, 20aj jaroj), la troa akcentado de la literaturo, la nemencio de kelkaj historiaj Esperantaj kulminoj en Kroatio kiel ekzemple de la historia agado de la signifa Esperanto-klubo „Bude Borjan“ en Zagrebo, de la unikaj 44a Internacia Junulara Kongreso de TEJO de 1988 en Zagrebo kun 770 partoprenantoj, de la 86a Universala Kongreso de Esperanto de 2001 en Zagrebo kun 1700 aligintoj kaj de la siatempe popularaj pupteatraj festivaloj de Zagrebo, en kiuj partoprenis Esperantaj teamoj. Anstataŭ menciigi la kompare signifan Josip Pleadin (kiun oni probable celis flati) oni estus povinta menciigi la verkaron de la pli konata *Spomenka Štimec* (kiu probable mem estis la iniciatinto de tiu propono kaj estis tro modesta por elstarigi sin mem),²⁹ aŭ emfazi la elstaran internacian rolon de Ivo Lapenna, la plej grava ekskroata esperantisto de ĉiuj tempoj, kiu estis ankaŭ la plej signifa prezidanto de UEA, aŭ la esperantistecon de la lingvosciencisto Dalibor Bro-

²⁴ Ankaŭ ĉi tiu frazo estas plena lingva fuŝaĵo.

²⁵ ‘Kulturfenomeno’ sen fino!

²⁶ Al tiu punkto devus aparteni ankaŭ la kritika prilaborado de la historio de la Esperanto-movado en komunisma Jugoslavio kaj sendependa Kroatio, kio mankas ĝis nun.

²⁷ ‘Taski’ estas tranzitiva verbo, do devas esti ‘taskitaj’.

²⁸ Vd. https://www.esperanto.hr/kroatio_esperanto_heredaĵo_espe.pdf;

http://esperanto.hr/nematerijalno_kult_dobro_esper_2019.pdf, <https://www.min-kulture.hr/default.aspx?id=29>.

²⁹ Vd. <http://esperanto-ondo.ru/Ondo/Lo-293demo.pdf>, p. 82.

zović. Indus atentigi ankaŭ pri la ekzisto de diversaj lokaj Esperanto-kluboĵoj en Kroatio, kiuj probable sentas sin ignorataj. Supozeble tiuj faktoj estis aldonitaj en la menciita „transdonita dokumentaro“. Kiel ĉefa argumento por la agnosko de Esperanto kiel nemateria kultura heredaĵo en Kroatio evidente servis la argumento pri „la rolo de Esperanto kiel lingvo peranto por [la] disvastigo de la kroata kultura, arta kaj literatura heredaĵo kaj moderna literatura produktado“, dum la sociaj karakterizaĵoj de la Esperanto-komunumo, kiel ili estis priskribitaj ekzemple en la pola pravigo aŭ analizitaj en iu libro de la konata kroata esperantisto Nikola Rašić, ŝajne estas duarangaj. Tiel, la propono agnoskigi Esperanton far la kroata ŝtato estas videble ligita al la propagando de la nacia kulturo, kiel tio estis praktikata de la Esperanto-movadoj ankaŭ en aliaj landoj kiel Pollando aŭ Bulgario.

Evidente, la decido de la respondeca Komisiono por la nemateria kultura heredaĵo de la Ministerio de la kulturo estis jam farita dum ĝia kunsido okazinta la 29-an de majo 2017, sed oni devis atendi la konfirmon de la koncerna Faka Komisiono por konstato de la karakterizoj de la kultura fenomeno, kiu sekvis dum ĝia kunsido okazinta la 18-an kaj 19-an de decembro 2018.

Cetere, inter la nemateria kultura heredaĵo de Kroatio, aldonita al la kroata UNESKO-listo (2015), troviĝas ekzemple la ĉiujara karnavalo de Kastav, la produktado de dolĉmielaj biskvitoj de norda Kroatio, la Ojkanje-kantado, la Ŝu-laĉa produktado de la insuloj Pag kaj Hvar, la procesio de la antaŭpaska ĵaŭdo sur la insulo Hvar, la ringrajda turniro de Sinj, la printempa procesio de Lje-lje/Kraljice, la festivalo de la sankta Blazio de Dubrovnik, la produktado de tradiciaj lignaj infanaj ludiloj de Hrvatsko Zagorje, la specifa kantado kaj muzikludado de Istrio, la rondancado de Dalmatio, k.a.³⁰

4. Slovakio kaj Litovio

Kiel *Peter Baláž*, prezidanto de Slovaka Esperanta Federacio (SKEF), raportis, la 29an de marto 2019 SKEF sendis oficialan proponon al la Nacia instituto (apartenanta al la Ministerio de la kulturo) por enskribi Esperanton en la slovakian liston de la nemateria kultura heredaĵo. La titolo de la propono estas: “Jazyk esperanto – nositeľ slovenskej a esperantskej kultúry” (La lingvo Esperanto – portanto de la slovaka kaj Esperanta kulturoj). La proponon akceptis kaj subskribis krom SKEF ankaŭ ĉiuj lokaj Esperanto-kluboĵoj/organizoĵoj kaj Slovaka Esperanta Junularo. Fine de la jaro 2019 oni devus informi pri la akcepto aŭ malakcepto de la propono, kiu estis subtenata de kelkaj konataj slovakaj politikistoj. Nun la slovakoj esperas, ke la propono trovos pozitivan eĥon ĉe la pritaksontoj; la decidan voĉon havos la ministrino pri kulturo de Slovakio. En kazo de sukceso Slovakio iĝus la tria lando (post Pollando kaj Kroatio), kie Esperanto estis agnoskita kiel nemateria kultura heredaĵo, kio eble jam donus la eblon proponi Esperanton kiel mondan heredaĵon de UNESKO.

PS dec. 2019: Laŭ la nova listo publikigita de Unesko, paĝo pri Slovakio, en decembro 2019 sur <https://ich.unesco.org/en/state/slovakia-SK>, Esperanto evidente ne estis enskribita kiel nemateria kultura heredaĵo de Slovakio.

Ankaŭ en Litovio nun okazas preparoj por proponi Esperanton kiel kulturan heredaĵon en ĉi tiu lando.³¹

Konkluda komento, kritiko – kelkaj konsideroj

Kiel oni vidis laŭ la ĉi-supraj ekzemploj, ĉiuj tiuspecaj projektoj dependas en principo pli malpli de kelkaj hazardaj izolite kaj individuisme agantaj privatuloj el la “civilsocio”, kiuj havas tian ideon kaj sendas, kiel iuj esperantistoj tion faris, sian proponon nome de la Landa Asocio aŭ de iu alia organizaĵeto rekte al la koncerna respondeca landa instanco, kiu konsistas el administraj burokratoj, kiuj devas decidi. La cetera Esperanto-movado restas indiferenta kaj pasiva rilate al tiu procezo kaj la landa popolo havas neniun influon por doni al la koncernaj decidoj demokratian statuson, do ili ne vere re-

³⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Register_of_Cultural_Goods_of_Croatia#cite_note-4.

³¹ Vd. <http://sezonoj.ru/2019/05/slovakio-25>.

prezentas la nacion. En la kazoj de Pollando kaj Kroatio tiu propona procezo havis pozitivan rezulton, dum la samaj klopodoj en Svislando finiĝis malbone.

Ĉar la dokumentaroj, kiuj estis senditaj de la proponintoj al la respondecaj landaj instancoj, ne estis publikigitaj, oni ne konas ilian enhavon. La publikigitaj resumaj komunikoj, kiuj devis respeguli la esencon de la pravigo de la koncerna propono, estas verkitaj laŭ tre supraĵa kaj rozkolora, subjektiva kaj parte eĉ iom primitiva maniero de la Esperanto-propagando. La polo klarigis, ke la enhavo de la pravigo pri Esperanto devis esti adaptita al la validaj formuloj de UNESKO pri la difino de la nemateria kultura heredaĵo, pro kio la teksto de tia pravigo foje impresas iom strange kaj la titolo „La lingvo Esperanto kiel portilo de la Esperanto-kulturo“ iom banale. Kutime, politikistoj kaj administraj oficistoj, kiuj devas decidi pri Esperanto, tute ne konas la Esperanto-historion en ĝiaj detaloj, sed ili ĉefe konas, kredas kaj admiras la mitojn, legendojn kaj asertojn, kiuj estis disvastigataj de la Esperanto-propagando dum jardekoj. La kruda ekskludo de tiklaj detaloj el la rakontado de tiu historio fare de la Esperanto-propagando kaj la totala manko de la kritika traktado de la historio de la Esperanto-movado fare de tiu movado mem, ekzemple dum la komunisma tempo, faras la tutan prezentadon de ĉi tiu temo altgrade manipulema, malhonesta kaj finfine dubinda kaj malkredinda, ĉar ĝi pli similas al la ideo de la Potjomkinaj vilaĝoj ol al la moderna informa informkulturo.

Kiun (materian) plusvaloron la registrado de Esperanto en la listojn de la nemateria kultura heredaĵo do donos aŭ donu al tiuj lingvo kaj movado estas neklare, nekonate kaj ne antaŭvideble. Por la fanfarona propagando de la Esperanto-movado, kiu substrekas nur sukcesojn kaj progresojn kaj pri-silentas problemojn, ĝi probable utilas kaj por la fiero de la esperantistoj ĝi taŭgas. Estus bone, se aperus novaj aktivuloj, kiuj scipovus utiligi tiujn agnoskojn por trafaj agadoj laŭ novtipaj metodoj, kiuj havus verajn utilon kaj sencon por Esperanto, ekzemple laŭ la kroata katalogo de rimedoj. Alikaze, la politika kanonizo de Esperanto en la koncernaj landoj restos vana kaj malatentata afero. Sed sen fortaj financaj rimedoj la tuta agado riskos limiĝi al hobiaj, amatoraj kaj honoroficaj sferoj, kun la konataj problemoj kaj sekvoj. Kaj sen novaj kompetentaj strategiaj receptoj kaj konceptoj, efikaj (infra)strukturaj organizaj reformoj kaj inteligentaj intelektaj enhavoj de la publiko kaj literaturo kaj sen freŝaj materiaj produktoj Esperanto riskos entute resti malvarma kafo, eksmoda movado de stranguloj, frenezuloj kaj fanatikuloj, kiun neniu moderna ekstera homo, kiu devas esti konvinkita pri la utileco de la afero, vere povas serioze konsideri por siaj vivaj kaj profesiaj perspektivoj.

La agado de la propono registri Esperanton nemateria kultura heredaĵo limigis sin ĝis nun al kelkaj landoj de orienta Eŭropo (inter kiuj la iamaj Esperanto-“bastionoj” Hungario kaj Bulgario tamen mankas). Slovakio kaj Litovio ankoraŭ provos (sed en Slovakio la propono ne sukcesis). Poste, kiam sufiĉaj landoj enskribis Esperanton en siajn listojn, oni eble provos atingi la saman rezulton sur la internacia nivelo, ke UNESKO agnosku Esperanton kiel nematerian kulturan heredaĵon. La obstakloj certe estos pli grandaj ol sur la nacia nivelo, sed kiel konate, UNESKO simpatie rilatas al la Esperanto-movado kaj eble favoros la proponon. Do, almenaŭ esperon la esperantistoj povas havi. Kvankam la esenco de Esperanto ne vere kongruas kun la formuloj de la koncernaj listoj de UNESKO pri la nemateria kultura heredaĵo, kiuj respegulas grandparte folklorisman komprenon, Esperanto tamen indas esti konsiderata kaj agnoskita kiel nemateria kultura heredaĵo de la homaro, kvankam tiel ĝi riskos iĝi folkloria klasifikaĵo. Ĉu ĝi do devas troviĝi en la sama vico kun la sennombraj folklorismaj esprimformoj supre menciitaj, kiuj konsistigas la plimulton de la monda nemateria heredaĵo de UNESKO kiel la polifonia kantado de Albanio kaj Kartvelio, la flutludado kaj panbakado, la religia pilgrimado, la araba kafo, la karnavalado, la bierkulturo en Belgio, la Samba-, Rumba- kaj Flamenko-dancado en Brazilo, la ĉina drak-boatfestivalo, la Kimĉi-produktado en Norda Koreio, la hinda jogo, la indonezia batiko, la iomanludo en Irlando, la kozakaj kantoj de Dnepropetrovsko, ktp. ktp., estas tamen iom dubinde (despli ke Esperanto ne disponas pri folkloraj tradicioj). Eble escepte de Pollando, kiu estas konsiderata kiel naskiĝlando de Zamenhof kaj Esperanto, por aliaj landoj mi ne vidas kialon por agnoski Esperanton nemateria kultura heredaĵo, ĉar en aliaj landoj tia nacia agnosko apenaŭ estas pravigebla. Kvankam ĝia agnosko kiel nemateria kultura heredaĵo en si mem sendube signifus grandan sukceson por la (agonianta kaj verŝajne elmortonta) Es-peranto-movado mem, Esperanto tamen restus fremda afero en la konscio de la plimulto de la homaro, kiu scias nenion pri Esperanto nek pri la ekzisto de la nemateria kultura heredaĵo de UNESKO. Do, la signifo de tia agnosko estus en si mem

tre limigata, fakte pli teoria ol praktika kaj eble komparebla kun la Esperanto-rezolucio de Montevideo de la jaro 1954.

Andreas Künzli, julio 2019

Koncerne la solvon de la -ata-/-ita-demando, mi ĝenerale orientiĝis laŭ la germanlingva modelo (war/wird/wurde depende de la tempo, plej parte pasinteco). Sed la tuta problemo estas komplikata/ita per la dimensioj de la adjek-tiva, tranzitiva kaj verbaspekta demandoj. Do, restas dubo en kelkaj kazoj (devigita/ata, akompanita/ata, miskom-prenita/ata, konsiderita/ata, nomita/ata, imagita/ata k.s.), pri kiuj oni povas verve diskuti.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, julio 2019.

Pri la aŭtoro: nask. en 1962 en Lucerno (Svislando). Studis (1983-91) slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato. Finis la studojn per diplomverkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio. Aŭtoro de la Svisa Enciklopedio Planlingva (2007) kaj de Zamenhof-biografio en la germana lingvo (2010). Vivas en Berno (Svislando). Lernis Esperanton en 1979 kaj estis aktivulo de la Esperanto-movado, kiun li intertempe forlasis pro ideologiaj kaj politikaj konsideroj, sed daŭre praktikas Esperanton, verkante historiografie pri esperantomavadaj, planlingvaj, orienteŭropaj, politikaj kaj lingvaj temoj.